

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-

Tutmonda Organizaĵo.

La neceson de tutmonda organizaĵo por la esperantista ruĝularo neniu jam plu povas fordisputi. Oni jam delonge diskutadas tiun demandon. Ĝis nun, bedaŭrinde, nur kun tre modesta sukceso. Anstataŭ konsentiĝi, kaj la tutan aferon transdoni al iu persono, kiu energie preparus la necesan fundamenton, oni je ĉiu kunveno destinas alian personon, kiu „interrilatu kun la eksterlandaj gekamaradoj”. Fine, kiam oni 1914 venos Parizon por fondi la organizaĵon, oni devos komenci la tutan laboron.

Rimarkinde estas, ke ĉiuj ĝisnunaj proponoj alcelas nur la fondon de internacia federacio. Mi jam delonge min okupadas per tiu demando. Mi konkludis, ke federacio, en sia propra senco, estas por ni senefika. Ni bezonas fortan organizaĵon, kiu estas taŭga plenumi ĉiujn devojn, rilate al administrado kaj lingvaj demandoj. Ĝiaj celoj estu:

a. La disvastigado de Esperanto inter la tutmonda laboristaro.

b. la interfratiĝo de la tutmonda laboristaro per Esperanto;
c. efektivigo kaj observado de la Esperanta evoluado.

Tiuj celoj estu atingotaj per:

a. Organizado de ĉiuj esperantistaj ruĝuloj el la tuta mondo en forta, unueca, do kapabla asocio.

b. kreado de bone funkcia, administracia aparato;

c. kreado de reprezentaro, definitive decidanta pri lingvaj aferoj;

d. kreado de centra librejo kun filioj en ĉiuj landoj;

e. Zorgigo por unueca ruĝula mondliteraturo.

f. Registrado por statistikoj.

g. atentigado de la gvidantaj instancoj de la internacia

laboristmovado per rezolucioj k.t.p. ĉiam denove pri la granda utileco de la internacia helplingvo Esperanto.

4. direktado de la internacia agitacio.

Jam de longe mi okupadas min pri tiuj demandoj; mi ĝis nun kolektis sufiĉe da materialo. Do mi estus en la stato ellabori detalan proponon por la regularo. Mi nun petas ĉiujn legantojn, precipe ĉiujn gvidantojn kaj sekretariojn por la internaciaj interrilatoj detale ekzameni mian proponon kaj skribi al mi sian opinion kiel eble plej baldaŭ.

Se la plejmulto tion deziras kaj la administracio de I.S.R. konsentos mi sendos al k-do Nutters la manuskripton por detala regularo kun necesaj klarigoj, por ke li aperigu je la 15-1-14 eksterordinaran numeron de I.S.R. kiu povus esti la fundamento de ĉiuj sekvontaj proponoj.

Estas ankaŭ necese, ke ni destinu personon, al kiuj ĉiuj ĝis nun kun tiu afero komisiitaj oficiantoj transdonu sian materialon.

Do: kuraĝe antaŭen!

M. MOLINUS, Kielstrasse 75/III,
Dortmund, Germanujo.

Okaze de la ligotago dum pasko 1913 en Frankfurt a. M. la Germana Laborista Esperanta Asocio venis al la konkludo ke estos bezone, ke ĉiuj laboristaj grupoj sendu delegitojn al la 10a Universala Kongreso en 1914, en Parizo, por ke ili diskutu pri fondo de tutmonda organizo laborista.

Ĝi petis, ke ĉiuj grupoj kaj asocioj interrilatu kun ĝi por ke oni fine komencu laŭplanan kaj celtrafan laboron por la disvastigo de nia lingvo.

Okaze de la ĝenerala jarkunveno de Bohema Laborista Asocio Esperantista en Praha, 1912, oni proponis regularon por tia Internacia Organizo. Inter aliaj ĝia tasko estis difinitajene:

Propagandi la Zamenhof'an lingvon en vicoj de klase organizita laboristaro de ĉiuj nacioj, prepari ĝian aprobon kiel internacian lingvon de monda klasa movado laborista, praktike faciligadi internaciajn rilatojn de laboristoj, eldonadi unuecan porinforman socialistan mondliteraturon kaj krei internacian proletarian Esperantan gazeton.

Tiamaniere devos esti praktike plifortigita internacia solidareco kaj klasa unueco de proletariaro.

Tiamaniere devos esti plialtigita ĝia ĝenerala batalkapablo sur monda forumo kaj tiel preparotaj la fundamentoj por estonta kulturo mondĉivitana.

En la fino de la jaro 1912, la Pariza „Fédération Syndicale Esperantiste" (Sindikata Esperantista Federacio) aprobis plejparte la projekton de niaj Bohemaj kamaradoj.

En junio, 1913, la E.S.F.I.O. (francaj verdsocialistoj) post diskutado pri la decidoj de la Frankfurt'a Kongreso, decidis:

1. ke la Espreantistaj laboristoj partianoj de la moderna laborista movado devas krei po unu organizajo por ĉiu regno.
2. ke la internacia organizado devos havi centran oficejon, kiu *regule* interrilatiĝos kun la naciaj asocioj.

El la ĉi supraj oni vidas, ke niaj kamaradoj jam decidis fondi internacian verdsocialistan organizon. Unueco estas forteco, kaj Esperanto estas lingvo, kiun ni ankoraŭ devas propagandi, tial sendube, la naciaj asocioj verdsocialistaj sendos al la deka kongreso en Parizo, delegitojn, kiuj diskutos la aferon.

TAGULO.

Al la internacia verdsocialistaro!

1813 LEIPZIG 1913.

18 de Okt. 1913, cent jaroj post la interbuĉado de l' popoloj, la germana patriotaro sentis la devon solene festi tiun ĉi tagon. Oni streĉis la lastan nervon, por plibeligi la nomitan tagon. Sed kiamaniere oni faris tion?

Antaŭ 15 jaroj la patriotoj konstruigis kolosan monumenton, rememorigante al la liberigaj militoj. Sub leĝa protekto oni aranĝis loterion al kiu la granda amaso de l' parteprenantoj malgajnis sian monon. Kvankam la loterio bone funkciis, la monumento ne jam estas pagita.

Tamen, estimata fiburĝaro scias helpi sin.

Dum la inaŭguracio de tiu ĉi ŝtonamasajo, la patriota Unuiĝo postulis nur 105 markojn por sidloko. Aliflanke ĝi faris tion, por ke neniu socialisto havu la eblecon partopreni je la festo proksime de ĉeestantaj princoj.

Kiam antaŭ cent jaroj la popoloj entuziasmiĝis por siaj reĝoj kaj princoj, tiam oni 1913 havis dubon je tiu ĉi fakto.

Zorgeme la policanaro faris ĉion por forigi danĝeron por la alvenintaj princoj. Kaŝe ili serĉadis, kie precipe estis trovebla revoluciema Ruso, kelkaj eĉ estas arestitaj dum la festo. Honorinda (?) Leipziga polico eĉ zorgis, ke dum la festo la aero estu sendanĝera, ĝi malpermesis la transflug-

adon de la urbo, por ke ne falu el iu aerŝipo bombo, kiu povus trafi iun ajn princon de la popolo tiom amatan.

Oni zorgis, ke sub la tero en la kloakoj ne troviĝu krimulo, kiu dum la traveturo de la amataj! registoj povus plenumi atencan. Plue oni zorgis, ke laŭlonge la feststrato nur troviĝu homoj plenaj da patriotismo. Unuavice oni metis 28000 da infanoj, eĉ la idiotoj el la lernejoj ne mankis.

Post la infanoj sekvis ĉeno da polico, unu apud la alia, ĉeno da soldatoj, ĉeno da militunuiĝoj, kantunuiĝoj, gimnastikistoj (inter la lastaj organizitaj laboristoj), studentoj kaj multaj aliaj tiaj hurapatriotaj unuiĝoj el Leipzig kaj ĉirkaŭaĵo, kiujn oni allogis por glori la tagon de la „popola liberigo“.

Tiamaniere la germanaj procentpatriotoj zorgis por kiel eble plej forta aplaŭdo kaj hurabruego dum la preterpasado de la princoj.

Dum la sama tempo troviĝis en Leipzig 20000 organizitaj senlaboraj impostpagantoj, kies infanoj jam de kelkaj semajnoj ne ricevis sufiĉe da pano. Tamen, la urbkonsilantaro decidis elspezi 160000 markojn por ornamajo de la urbo. Tiun ĉi sumon grandparte enpoŝigis la negocistoj, kiuj memkompreneble havis kaŭzon, hurai.

Al veteranoj oni promesis 50000 markojn, por ke ankaŭ ili povu travivi belan tagon abunde.

Sed, ĝis hodiaŭ ili ne jam ricevis eĉ pfenigon, oni denove konsolas ilin, ĝis kiam la lasta veterano kun siaj trapafitaj ostoj estos mortinta. Eĉ burĝaj gazetoj indignas pri tiu ĉi malinda konduto de niaj %-patriotoj.

Ne estas forgesinde, ke dum la spektaklo la laborantaj laboristoj estis parte devigitaj, festi la tagon, kaj tiujn, kiuj postulis rekompencan, oni eksigis. Preskaŭ ĉiuj laborejoj estis fermataj. Oficejoj estis fermataj, eĉ la poŝtoficiistoj nur malmultajn horojn deĵoris.

Al la Rusoj oni agrabligis la ĉeeston. Ĉar estis konstruita rusa preĝejo en Leipzig, alvenis rusa princo Kyrill kun tagmento da kosakoj, kiuj pli agrable kaj pli afable estis akceptataj ol la tiama aeronaŭto franca en Hamburg.

Du semajnojn antaŭ la inaŭguracio de l' rusa preĝejo, ĝi estis akurate gardata de multaj policianoj; dum la nokto ĝi estis per lumo traserĉata. Evidente, la piemaj patriotoj ne fidis al la dia paco en la rusa preĝejo.

Ne malproksime de Leipzig troviĝas ŝtonmino, eble ses kilometroj de ĉi tie. La timemaj patriotoj per fajrobrigad-

istoj gardigis la ŝtonfosejojn, ili observis la pulvoturon, por ke neniu fripono stelu iomete el ĝi, kaj ke per ĝi ne okazu io al la admirata ŝtonkoloso en Leipzig.

Ni vidas per tio, ke nia patrujo troviĝas en danĝero, sed nur en patriota danĝero, ĉar neniu homo eĉ tuŝis iun el la pli bona socio.

Nun la spektaklo estas pasinta sen iu okazintaĵo. De ni socialistoj la patriotoj ne devas timi krimon, ĉar ni abomenas sang-oferon, ni ne volas venĝi pro la proletara sango fluinta antaŭ cent jaroj.

Ni volas pacon internacian, tutmondan, daŭrantan. Ni preferas, kulturi la kapojn de la amasoj, ĝis la lasta laboristo ekkonu nian klasbatalon kaj aliĝu al ĝi.

Ni voku al regantoj: Ignoru nin! kiel ĝis nun, ĝis kiam ni estos unueca amaso kontraŭ vi! Dormu! Ĝis kiam ni estos vekintaj la lastan indiferentulon kunkonstruintan viajn monumentojn, por faliĝi vian nunan socion!

Leipzig.

MEHLHORN.

Pri la afero de Beilis.

Finiĝos jam baldaŭ la unua kaj komencos la dua monato de post la tago, kiam la atento de la tuta civilizita homaro direktiĝis al la centro de sud-okcidenta Rusujo, en la urbon Kievo. En multaj diverslingvaj, diverspartiaj kaj senpartiaj gazetoj enpresigis ĉiutage artikoloj, allogantaj antaŭ ĉio la legantaron: „La proceso de Kievo“, „La afero de Beilis“, k.t.p. La nomo de Beilis estas konata al la tuta kultura homaro. Ĉiu scias, ke Beilis, hebrea laboristo, kiu ĉiutage laboris por gajni siajn vivrimedojn, nun troviĝas sur benko de juĝatoj antaŭ la juĝo de jurintaj asesoroj, en Kievo. Li estas akuzita je rita mortigo de kristano knabo Juŝĉinskij pro religiaj motivoj.

Ĉiu pensokapabla homo, leginte la akuzakton certe komprenas, ke malpli ol iu ajn Beilis povis esti mortiganto de Juŝĉinskij. Sed tia „juĝo eraro“ estas ja ofta aperaĵo en la ruslanda efektiva vivo. Centoj, ja miloj kaj dekoj da miloj da senkulpaĵaj homoj estas mortpunitaj, en malliberejoj kaj ekzillokoj turmentitaj dum la lasta jardeko en Ruslando. Sed neniu proceso eivokis tian grandan atenton de diversaj klasoj de la homa socio, kiel tiu ĉi, la proceso de Beilis. Kie do estas la kialo?

En la proceso de Beilis estas juĝata ne nur unu persono,

ne nur Beilis; tuta aro da homoj, tuta nacio al kio apartenas Beilis, la tuta hebrea ro estas akuzita je barbareco, estas kulpigata je uzado de kristana sango. Ne nur Beilis, miloj, milionoj da tiaj Beilis'oj, devenantaj de la sama, hebrea nacio estas akuzitaj je sangavideco... Ili mortigas kristanajn knabojn, por uzi ilian sangon... Ĉu vi ne kredas?? Tion ja „pruvis” granda rusa scienculo-psikiatro, profesoro Sikorskij kaj ankaŭ... katolika pastro Pranajtis!

Terure! Ekŝajnas, ke ni revenis en la malnovan aŭ mezan epokojn. La malnova, abomena legendo pri ritualaj mortigoj, tiel multe suferiginta dum multaj jarcentoj la hebreajn kaj ŝajnanta jam esti forgesita, denove ekvivis en „kultura” Ruslando.

Legante la detalaĵojn de la proceso (estus tre interese priskribi kelkajn, karakterizantajn la „caran justecon”, sed manko da spaco min detenas de tio; espereble, tion faros kamaradoj el Rusujo), fariĝas kompreneble, ke la iniciativo de akuzo de Beilis eliras el la registara centro. Estas ankaŭ klare: ne la kulpigo de Beilis mem, sed la kulpigo de la tuta hebrea ro — jen la vera celo, la vera aspiro de la rusa, cara registaro!

Kio do estas la kaŭzo de tia aspiro?

Por tion kompreni, sufiĉas trarigardi la lasttempajn socian movadon en Ruslando. Ni ĝoje povas konstati, ke ĉiutage pli kaj pli evoluas tie la laborista movado. Preskaŭ ĉiutage okazas strikoj, mitingoj, demonstracioj, kvankam malpermesataj. La terura fantomo de la 1905a revolucia jaro ekstaris antaŭ la carismo. Ektremis, ektimis la regantaro, antaŭ sentante sian proksiman finon. Kaj jen, ĝi ĝustatempe(?) komencas serĉadi sufokilojn. Ĝi bone scias, ke la rusa hebrea ro, dank' al tia senrajta situacio, kian ĝi okupas en la „kara patrujo”, ĉiam estos en la unuaj vicoj de ribelontoj (precipe la malriĉularo, kiu formas signife pli grandan parton de 6 milionaj hebrea loĝantaro). Kaj nun, per akuzo je ritaj mortigoj, per plej malnobla antisemitismo ĝi provas elvoki en la rusa popolo pereigantan ŝovinisman, nacian malamegon al la hebrea ro, kaj, dividinte tiamaniere la fortojn de ribelontoj, pli rapide malaperigi la revolucionan movadon. (Inter alie mi rimarkas, ke tio ĉi estas malnova „rimedo” de la rusa registaro: ekmemoru la „pogromojn” dum la revolucio de 1905a jaro!). Ni vidas, ĝi, la registaro, uzas ĉiujn rimedojn, por malebligi la eblan liberigon de la popolo.

Sed... vane!!

Ĉu Beilis estos pravigita aŭ ne (pli verŝajna estas la unua supozo) la rusa popolo ne trompigos sin!

Ni scias, ke multaj rusaj (laŭ nacio!) laboristoj kune kun hebreaj aranĝis strikojn kaj mitingojn protestajn kontraŭ la proceso de Beilis. Tio ja pruvas, ke la rusa proletariaro jam bone ekkonsciis, ke nur du nacioj ekzistas en la mondo: nacio de posedantoj kaj de senposedantoj! Ke ne en naciismo kaj ŝovinismo estas la savo! Ke nur revolucio kontraŭ la tiranoj estas sola vojo al liberigo! La sola vojo al estonteco, kie ne plu havos lokon tiaj abomenaĵoj kaj kruelaĵoj, kiel afero de Beilis!

Kaj tion ĉi pruvos al ni la proksima estonteco!...

G. S—R.

Bildoj de Malriĉeco.

II.

Se iu el vi jam faris mensan noton, ke „malriĉeco naskiĝas pro drinkado”, tuj forigu tion antaŭ ol ni daŭrigas; ĉar en ĉambro en la proksima domo troviĝas junulino penanta vivsubteni sin mem, vidvan patrinon, kaj junan frateton, sidante ĉe kudromaŝino 16 horojn el 24. Ĉi tie ne vidiĝas alkoholaĵoj, pro tio la ĉambro estas pli pura, sed la tragedio estas egale profunda. Ŝia patro estis skribisto, kiu sukcese vivsubtenis siajn infanojn kaj edzinon sufiĉe komferte per 15 sm. ĉiusemajne ĝis kiam li ftiziĝis precipe pro multlaborado super pupitro kaj malbona ventolado. La malmultaj funtoj sterlingaj ŝparitaj de li apenaŭ saldis la enterigajn kostojn kaj tial ĉi tiu knabino devis havigi la necesojn al la patrino — tro malforta por plu labori — al la frateto, kaj al si mem.

Batalinte kelkajn monatojn kun streĉitaj fortoj kontraŭ malsato, dum kiu tempo la plimulto el la meblaro vendiĝis por pano, ili sin trovas en ĉi tiu kvartalaĉo (slumaro), kun nenio krom tio, kion ŝi povas enspezi per sia kudromaŝino inter ili kaj malriĉulejo.

Se ŝi estas bonŝanca, ŝi ja povas enspezi tiom, kiom 6 sm. semajne; sed bonŝanco ne ofte favoras ŝin kaj ŝia meza enspezo estas ĉirkaŭ 4 sm. semajne. Estas neeble priskribi al vi kiel tiuj tri estaĵoj ekzistis per 4 sm. ĉiusemajne. Mi jam intencis montri al vi ekzemplan semajnan budĝeton, sed ne povis preterpasi la unuan detalon; „lupago 1 sm. 240”. Se iu serĉas instruan problemon por ellabori, mi rekomendas

la jenan: Per 2 sm. 760 havigi al tri personoj nutraĵojn, vestaĵojn, brulajon kaj ĉion necesan por dece ekzisti unu semajnon. Du jarojn la patrino provadis tion fari sed forlasis ĝin. Unu vesperon ŝi enlitiĝis pli frue ol kutime, kaj la sekvantan dimanĉon la gefratoj enlitiĝis sen ŝi. Tio preskaŭ rompis iliajn korojn; sed la knabino konfidis al knabo najbara, ke la Morto certe donis al ŝi multdeziratan liberigon.

Post la morto de la patrino ŝi pli facile sukcesis ekzisti per siaj enspezoj, kaj ŝi eĉ pligrandigis siajn elspezojn luante alian ĉambron. Ŝi komencis timi pri la farto de sia frateto; li konstante plendis pro doloroj ĉe la sternumo, kaj liaj vangostoj elmontriĝis pli akre ĉiutage. Ŝi pensis, ke la ekstra ĉambro donus al li pli da komforto, kaj senigante sin ĉiel kiel eble, ŝi sukcesis liveri al li, de tempo al tempo, iom pli da fortigaj nutraĵoj.

Sed jam estis tro malfrue.

Ŝi havigis al li lokon en sanatorio, kien li iris, sed post unu, du semajnoj li estis resendata kun deklaro „neresaniĝebla”. Li mortis en ŝiaj brakoj. Ŝi lin enterigis apud la patrino kaj residiĝis ĉe sia kudromaŝino.

III.

Rigardu denove. En alia ĉambro super tiu sama malgranda butikio estas knabino ĵus alveninta el la kamparo kun la ruĝo de bonfarto ankoraŭ sur ŝiaj vangoj. Ŝi venis por loĝi ĉe sia fratino kies edzo vagas de urbo al urbo por trovi laboron. Li sendas hejmen, tiom ofte kiom eble, kelkajn spemilojn, kaj la edzino enspezas kiam ŝi povas trovi laboron.

Sed venas tago kiam ŝi sentis ke estas necese ĉesi labori iom da tempo kaj pro tio ŝi petis sian fratinton viziti ŝin por ke ŝi helpu subteni la hejmon dum la alveno de infaneto. La knabino venis, je ĝojo de la gepatroj, kiuj penadis subteni familion da sep kreskantaj geknaboj per 6 sm. ĉiusemajne kun „domo” senpage.

Pasis iom da tempo antaŭ ol ŝi kutimiĝis al la malesto de verdaj kampoj, birdoj kaj sunbrilo; sed post nelonge ŝi sentis sin ĉe-hejme kaj komencis serĉi ian laboron.

Dum kelkaj semajnoj nenio riceviĝis de la edzo vaganta kaj mono malpliĝis ĉiutage.

Lerte ŝi povis uzi kudrilon, pro tio ŝi sukcesis havigi al si laboron ĉe tute respektata firma de „altrangaj” tajloroj je 3 sm. semajne. La labortagoj estis terure multhoraj kaj la laboraĵo preskaŭ blindiga; sed 3 sm. ŝajnis al ŝi malgranda riĉeco.

Post kelke da tagoj, la knabo loĝanta supre aŭdis dolorĝemojn venantajn el la ĉambro sube; tiuj komencis malfrue en la tago kaj daŭris la tutan nokton.

Malsuprenirante la ŝtuparon la sekvantan matenon, li eksciis pri kio okazis. Alia buŝo por nutri, alia animo kondamnata al vivo de mizero kaj malriĉegeco.

Kiel ĉi tiu knabino sukcesis subteni sian fratinton kaj infaneton vive per 3 sm. semajne ĉiam restos mistero al ĉiuj krom al tiuj miloj kiuj ankoraŭ devas tion fari. Ŝi iel sukcesis ĝis la resaniĝo de la nova patrino. Tage ili lasis la infaneton en la zorgo de iu virino dum ili laboras kaj tiel sukcesis kuenteni animon kaj korpon.

Dume la knabo supre jam rimarkis ke la knabino el la kamparo ŝanĝiĝas; kiam li unue ŝin vidis ŝi estis vestata senorname kaj tre nete, sed nun ŝi portas multkolorajn vestaĵojn, kaj ŝajnas al li ke ŝiaj okuloj senesprimiĝas tiel kiel tiuj de lia patrino.

La viro vaganta hejmenvenis — kaj ŝi malaperis el tiu strato por ĉiam.

Kiam la knabo revidas ŝin, ŝi aspektas kiel bonhava sinjorino. Ŝiaj vestaĵoj estas tute novaj kaj odoraĉas pro parfumo malaltgrada; sur ŝia kapo, kokete metita, troviĝas grandioza ĉapelo, kaj anstataŭ la delikataj rozkoloraj vangoj, kiujn li memoras je ŝia alveno urben, vidiĝas malbelaj ŝmirajoj de ruĝkoloro kaj pudro.

Ŝi estis unu el tiuj 700,000.

Tiuj bildoj ne estas rezultato de antaŭjuĝa imagado; ili estas absolute veraj laŭ vivo en ĉiu detalo. Krudaj eble ili estas; mankas al ili korekta artista stilo kaj poluro.

Sed mi ja penis ilin pentri ekzakte kiel mi ilin vidis; ĉar ili estas kvazaŭ enbruligitaj en mian memoron.

Kaj pastro diris al mi, ke Socialismo certe detruus tiun grandan nacian trezoron: la „hejma vivo de la lando”; ke Socialismo forigus la plej bonan donacon donacitan de Dio al la homaro, la „liberecon kaj la sendependecon de la individuo”.

Ke Socialismo farus sed jam mi lin forlasis por kolekti monon por la malsatantaj infanoj de la strikantoj.

Kun permeso de la Eldonistoj
el la angla lingvo tradukis.

RUĜA LEONO.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

La striko daŭras en Dublin, sed la policanoj kvazaŭ saĝiĝis, kaj de post la lasta raporto, ne okazis tumulto. De la 27a de Sept. la federacio de unuiĝintaj laboristoj, sendas, ĉiusemajne, nutraĵojn, kies valoro ĝis nun (25/10/13) estas ĉirkaŭ 100.000 Sm. La federacio de ministoj garantiis monhelpon ĉiusemajnan, dum la daŭro de la striko, de 10.000 Sm. kaj aliaj unuiĝoj malpli grandan sumon. La domposedantoj eldomigis kelkajn, kiuj ne ĝusttempe pagis luprezon, kaj la strik-komitato tuj havigis tendojn, kiujn oni starigis ĉe parko apartenanta al la unuiĝo de la transportistoj Irlandaj.

La argil ministoj ĉe Cornwall devis cedi al la tieaj estroj, plejparte pro manko da mono. Okazante samtempe kiel la pli granda kaj pli grava striko ĉe Dublin, la atento kaj monhelpo estis iomete detiritaj.

La 14an de la nuna okazis tre bedaŭrega esplodo ĉe karbmino ĉe Sud-Kimrujo, preskaŭ 400 pereis. Laŭ la jurnalaj raportoj la ministoj mem sciis pri la amasiĝo de gaso, sed la registaro ne faras sian devon pri la deviga ekzameno de minejoj de spertuloj, kiuj raportus pri la sendanĝereco de la minejoj.

S. B.

El Austrio.

En Vieno okazis la kongreso de soc. dem. partio. La delegitoj el Vieno kaj Graco proponis, ke soc. dem. deputitoj agu pli akre kontraŭ militistaj postuloj kaj kelkaj ŝtatbezonoj. Oni eĉ rekomendis obstrukcion. Krom tio la delegitoj penis atinĝi tion, ke la deputitoj s. d. insistu je leĝigo de maljunec- kaj invalidasekuro.

Militista administracio denove postulas plialtigon de militista povo. Ĉar ĉiuj eŭropaj ŝtatoj plifortigas siajn armeojn, oni estas devigata, laŭdire, nian armeon pligrandigi de 212.500 je 31.300, tiamaniere, ke la armeo konsistu en j. 1918 el 243.000 viroj. Tiu ĉi pligrandigo de l' armeo bezonus proksimume 73.360.000 kronojn.

Oferoj de laboro. Krom grandegaj profitoj la laboristaro estas devigata oferadi ĉiujare al kapitalista dio Mamono eĉ sian karan sangon, eĉ siajn vivojn. Laŭ la oficiala raporto estis en 1912. 100.000 da laboristoj vunditaj kaj 704 mortigitaj dum laborado. Laboristo oferas siajn sanon

kaj vivon, dum kapitalisto rabas de lia laboro la milionojn, rosumitajn de l' homa sango, kiun laboristo devas oferi al kapitalista dio.

FAJFISTO.

El Hungarujo.

La moraleco multe subfalis dum la lastaj jaroj en ĉiu tavolo de la socio, precipe tio estas sentebla ĉe la kategorio de la jurnalistoj, el kiuj multaj estas riceveblaj por ĉio pro mono. La registaro do decidis reformi la presleĝon, por bridi iom la ekscesojn de la gazetaro. Sed tiu reformo certe pli malutilas ol utilas al la presaro kaj ĝi servos nur al la potenculoj. Pro tio la opozicio denove bruegas en la lando (antaŭ tri jaroj ĝi volis fari pli reakcian reformon), sed ne kun multa sukceso, ĉar la burĝoj ne multe zorgas pri la mensoga gazetaro. La socialistoj ankaŭ batalas kontraŭ la registaro kaj por la preslibereco kaj ili estas la plej laŭtaj en la lando. Sed kiel ili komprenas presliberecon? jen estas denove unu ekzemplo:

La 19an de Oktobro tenis sian kongreson la soc. dem. partio en Budapeŝto, en kiu okazis nenio, kio meritis la inkon. Dum la somero ĉirkaŭ 300 laboristoj eliĝis el la organizado de la lignajistoj, ĉar oni eksigis kelkajn laboristojn, kiuj volis scii, por kia celo oni turnas la monon pagitan de la membroj? La eksigintoj tuj fondis alian organizadon kaj gazeton. Tiun ĉi gazeton volis disdoni du lignajistoj al la kongresanoj antaŭ la kongresejo. Kaj kio okazis? El ilia presliberecemo oni povus konkludi, ke ili bele akceptis la presadon kaj tralegis. Sed ne tiel okazis. Ili batis la du disdonantojn kiel la dufundan tamburon, kial tiuj kuraĝis disdoni gazeton, en kiu ili plendis pri la maljustaĵoj, faritaj al ili de la partiestraro.

S.

El Ĥinujo.

Nia gazeto, pro la propagando de ideoj de anarĥiismo, estis malpermesata de Ĥina malbonega registaro, kaj la redaktoro-eldonisto estas persekutita. Tial ni devis transloĝi al Macau (Portugala kolonio antaŭ la buŝo de l' Kantonrivero. Red.) por la reapero. Kvankam ne sufiĉe fortaj ni estas, ni certe per nelacigebla energio antaŭenpaŝos ĉiam.

La ekzempleroj de tria numero de nia gazeto, jam presitaj, sed ne ankoraŭ senditaj, estas tute difektitaj de la malbonuloj. Ni okupas nin nun je la reparaĵo; sed, pro la subita transloĝigo de la presejo, okazis grandega malprofito Eble,

la reapero de nia gazeto estos post unu monato. Ni petegas niajn legantojn ke ili bonvolu pardoni la prokraston.

La Voçe de la Popolo.

Novadreso: Sifo 41, Rua da Praia Grande, Macau, Azio.

El Meksiklando.

Prezidanto Wilson venkas la kanibalon Huerta. Estas konsole trovi ankoraŭ inter la nunaj registoj de la mondo homojn de grandaj idealoj, kiuj ne fleksiĝas antaŭ la ĉiopovo de Dio Mono!

Prezidanto Wilson donas lecionon al ĉiuj aliaj registoj, kiuj rapidis premi la manon de Huerta, ankoraŭ malsekan per la sango de la martiro Madero. Prezidanto Wilson vangfrapas tiujn, kiuj je la nomo de Paco, Ordo kaj Negoco fermas la okulojn antaŭ abomenaj krimoj.

Prezidanto Wilson havas la moralan kuraĝon toleri la mokaĵojn kaj insultojn de la tutmonda gazetaro pro sia nobla sintenado antaŭ tiuj ĉi mortigantoj. Eĉ la usonaj „respublikanoj”, kiuj formas la Dolaran Partion, ankaŭ atakas akre la demokration Wilson; nomas lin malsaĝulo, Kihoto, ridindulo kaj tiel plu....

Huerta, kolera pro la nerekonigo de Wilson, incitis la meksikan popolon per sia filatanta presaro, kontraŭ Usono, sed feliĉe nur kelkaj idiotuloj respondis al la alvoko, kaj aliaj idiotuloj en Europo gratulis Huerta por „sia patriota kaj energia sinteno antaŭ la humiliganta interveno de Wilson en la sanktaj aferoj hejme”. Kaj oni forgesas(?) ke Huerta, De la Barra kaj Felix Diaz aranĝis la „coup d'état” kaj la mortigon de Madero ĉe la usona ambasadorejo. La rolon de konsilanto ludis la fama „respublikana” ambasodoro Henry Lane nun eligita de Wilson.

Vidu, popoloj, kiel interpretas la „patriotismon” la pliparto el nomataj saĝaj ŝtatestoj kaj gloraj militistoj! Vidu kiel elastajn konsciencojn ili havas!

Sed malgrau ĉio, Rezonon venkas, kaj Prezidanto Wilson faras al ni grandan bonon, ĉar kvankam la nuna stato de industrio kaj komerco estas tre malbona (mi mem eble baldaŭ estos senlabora) pro la manko de mono kaj manko de konfido pri la situacio, ĉio ĉi estas nenio antaŭ la savo de individuoj kiuj atingas povon per krimoj kaj perfidoj.

Huerta intencis elektiĝi, kiel Porfirio Diaz, la senmovan

Prezidanton, sed Wilson tre klare sciigis la Kanibalestron, ke li ne rekonus lin, kaj nun ni ne plu havas sur ni tiun danĝeron. Huerta jam abdikis kandidatecon.

Oni multe parolis antaŭ nelonge pri milito inter Usono kaj Meksiklando, sed ĉio tio estis artifikajoj de la burĝa presaro. Wilson jam diris publike ke por defendi eĉ ĉiujn usonajn milionojn da dolaroj, li neniam oferos eĉ unu soldaton. Mi ne dirus same, se oni parolus pri Roosevelt au alia simila birdo....

La movado daŭras. Malfacile oni trovos en alia lando presaron tiom malkuraĝan pri la tiranaĵoj kaj tiom superrajtema pri la honestaj homoj kiom la nia. Porfirio Diaz per siaj tridek jaroj de subpremado putrigis la sentojn de niaj gazetistoj. Ĉiuj kiuj je la nomo de la ne ankoraŭ plenumitaj deziregoj de la Revolucio 1910—1911, faris tiom da malbono al la reĝimo de Madera, nun parte pro timo, parte pro la donaco, vendis siajn plumojn kaj siajn konsciencojn al Huerta. Ĉiutage ili presas artikolojn kontraŭ la revoluciistoj, raportojn pri fantaziaj bataloj inter la armeo kaj la „banditoj” en kiuj bataloj 30 „federaloj” mortigis 300 ribelulojn, kaptis 50 el ili kaj ankaŭ sennombrajn pafilojn, kartoĉojn kaj tiel plu. Sekve, Huerta, per telegrafo, promocias la „espartanajn oficirojn”....

La sola afero kelkfoje vera, estas tiu pri la kaptitoj; tamen, tiam ne relatus ribelulojn, sed malfeliĉajn enlandulojn, kiuj falas en la manoj de tiuj ĉi kanibaloj.

Tie ĉi mem, kie mi loĝas, estas regiono kies topografio ebena ne taŭgas por la revoluciistoj kaj tamen antaŭ kelksemajnoj; oni diris, ke nombro da ribelantoj marŝadis kontraŭ tiun ĉi vilaĝon. Ĉar tie ĉi trapasas la ĉefa fervojo al nordo, la kanibaloj timis, ke oni detruu ĝin kaj ili sendis kolonelon kun ducent homoj.

Ili havis nenian bataleton, neniu revoluciisto proksimiĝis, sed la sinjoroj militistoj publikigis raportojn pri la kapto kaj rekupto de tiu ĉi vilaĝo, la mortitaj „banditoj” kaj tiel plu. Mi ne povis kredi tiom da cinikeco, sed mia miro transformiĝis je kolerego kiam ili pendigis kelkajn enlandulojn, kiuj certe ne estis revoluciistoj!!

Kaj kiam mi legas en la gazetaro pri la mortpafado aŭ pendigo de „kaptitaj banditoj”, mi estas preskaŭ certa, ke ili estas aliaj novaj krimoj aldonitaj al la jam granda kalkulo de Huerta, la sangema militistaĉo.

Ĉiuj ĉi kruelaĵoj pligrandigas la armmovadon kaj devigas

la revoluciistojn ankaŭ senmanke mortpafi la oficirojn aŭ militestrojn, kiuj falas en iliaj manoj.

Laboristoj alilandaj: aliĝu al ni por admiri la demokratran prezidanton Wilson de Usono, kiu rifuzis helpi morale tiun ĉi buĉiston!

Meksiko, la 1an Oktobro 1913a

GENUARO E. TERRUÉ.

El Rusujo.

Terurega Kroniko el caraj malliberejoj. — Gornyj Zerentuj, katonga malliberejo. En karcero memmortiĝis K-do Viktor Rezner, ano de partio socialistoj-revolucionistoj. K-do Rezner estis bategata, ĉar li ne volis respondi al estro de malliberejo Kovalev, kiam tiu satrapo demandis lin per „ĉi”.

Orzel. Post la „akceptado” (oni tiel nomas batadon, kiu ricevas ĉiu malliberulo tuj post la alveno en Orzel’an malliberejon) mempendigis sin K-do Sapatnicki, studento de Peterburga Universitato.

Moskvo. En malliberejo „Butyrki” memmortiĝis K-do V. Tadzslav Ostrovski, ano de Pola Socialista Partio.

Censtohova, prusa parto de Polujo. Mempendigis sin malliberulo Javorski.

Ryga. Memmortiĝis politika katorgulo Dargiel.

Kijev Veneniĝis malliberulino Martman.

Tomsk (Siberio). Mempendigis sin malliberulo Orlenko.

Kirenski distrikto (Siberio). Per malsato mortis politika elsendito K-do Gerbovski, studento.

Vilno. En malliberejo mortis K-do Gotovko. La kaŭzo: ĝenerala malfortigo pro ne sufiĉa nutrado.

La malliberuloj je okazo de tiu ĉi morto organizis mal-satan strikon.

El „Politika Malliberulo” tradukis Janko.

P.S. Mi povas citi ankoraŭ kelkdekojn da tiuj teruregaj faktoj, el la sama numero de „Politika Malliberulo”. Mi elektis nur tiujn, kiuj finiĝis per memmortigo. Sed, mi pensas, ke supre cititaj sufiĉas por perdi esperon en humaneco de civilizita Eŭropo. Dum en Rusujo okazas ĉiutage teruregaj krimoj, kiam el Rusujo audiĝas ĝemoj de barbare turmentataj gesocianoj, neniu en aliaj regnoj de Eŭropo protestas kontraŭ tia sovaĝa inkvizicio. Male. La rusa regnestro havas amikojn en Eŭropaj ŝtatoj ekzemple la regnestro de libera Anglujo kaj de Franca respubliko. Ĉu ne

estas ridinde, ke la sama rusa sang caro Nikolao IIa prezentis sin al balkanaj popoloj kiel amiko kaj savanto de slavoj!?

Dio defendu nin de tiaj amikoj.

JANKO.

Resumo de la proceso de Beilis. — Beilis estas pravigita. La vero ektriumfis, kiel diras liberaloj. Jes, sed unu briko restis. Kaj estos nenio mirinda, se prenante tiun ĉi brikon por fundamento, nia regnestro enscenigos novan ritecan „aferon”. Tie ĉi oni devas serĉi la tutan sekreton de tio, ke la verdikto kontentigas ĉiujn, ankaŭ la nigracentanojn. Beilis estas pravigita, diras liberaloj; sed tuta afero estas ja ne en Beilis, responde krias nigracentanoj — la ĉefajo estas, ke la riteco estas pravigita. Fakte triumfis ambaŭ partioj, sed nek unu, nek alia plene venkis. La nigracentanoj esperis je plena venko, ĉar ĉiuj cirkonstancoj favoris ilin. Estis ja inter la 12 jurintaj asesoroj sep malkleraj vilaĝanoj, kredantaj ne nur je la riteco kaj hebrea superforto, sed ankaŭ ekzemple je tio, ke nokte antaŭ kristnasko sorĉistinoj rajdas sur balailo en aero. Por tiuj sinjoroj la prezidanto de juĝejo estas Dio kaj caro samtempe.

Al la asesoroj estis proponitaj de juĝistaro 2 demandoj. Je la unua demando: Ĉu ili opiniis pruvita, ke la krimo estas farita sur la teritorio de brikfabriko de hebrea Zaicev; ke al la viktimo estis pikitaj 46 vundoj; ke de la sango oni prenis 5 glasojn, k.t.p. — la asesoroj respondis: „Jes estas pruvite.” Kiel vi vidas, ĉi tie oni ne parolas pri riteco, sed la aludo je tio sufiĉas. Nun estas kompreneblaj la krioj de nigracentanoj: „la riteco estas pruvita! hura!” Sed tiuj „sinjoroj” forgesas, ke pruvi la ekziston de la riteco povas ne tiuj malkleraj rusaj vilaĝanoj, ne sciantaj eĉ, kio estas Talmud kaj ne komprenantaj eĉ unu hebrealingvan literon. „Ĉu hebreatoj fi-uzas kristanan sangon, tion povas diri nur scienculoj, kompetentaj je hebrea lingvo kaj religio”, jen kiel opinias unu el rusaj ĉefepiskopoj. Sed scienculoj de tuta Eŭropo jam diris sian voron, diris ĝin ankaŭ la reprezentantoj de katolika kaj luterana eklezioj; ankaŭ tiuj de ortodoksa eklezio, certe parolus, sed pro tre kompreneblaj konsideroj ili nun devas silenti. Tiunmaniere okazis, ke en la juĝejo, kiel eklezia kompetentulo staris katolika pastro Pranajtis. En la ministrejo oni malkaŝe diris al Pranajtis: Vi estas ĉe ni la sola; helpu nin! Je granda rekompenco Pranajtis konsentis.

Je dua demando, kiu estas iomete la ripeto de la unua, sed pli disvastigita, kaj en kiu oni rekte kulpigas Beilis kun „liajn ne-aperigitajn kunkulpulojn”, la asesoroj respondis nee.

Ci tie la sorto de Beilis, kiel oni diras, „pendis al unu haro”. La voĉoj de la asesoroj ja estis 6 por kaj 6 kontraŭ kondamno de Beilis, — sed tiaokaze la akuzato estas pravigita.

Malgraŭ tio ĉi, ke kontraŭ Beilis mankis iuj pruvoj, — li nur hazarde ne estas kondamnita. Rusa malklera vilaĝano, kredanta je la riteco kaj sorĉistinoj, kredis ankaŭ je la kulpo de Beilis, malgraŭ foresto de pruvoj. Tiamaniere la absolvo de Beilis ne estas afero de konscienco de rusa vilaĝano, kiel diras liberaloj; ĝi estas — l' afero de hazardeco.

Beilis pasigis en malliberejo 2½ jarojn, sen iu pruvo kontraŭ li, nur je la favoro de nigracentanoj...

Dum 34 tagoj de la proceso estis konfiskitaj 32 N. de gazetoj kaj 6 broŝuroj, 3 gazetoj estis fermataj, inter ili ankaŭ la plej malnova hebrea gazeto; 43 gazetoj estis monpunataj, sume je 12860 rubloj (ankaŭ „Za Pravdu” je 300 rubloj por la artikoleto, traduko de kiu aperis en 12a de „I. S. Revuo”); 12 redaktoroj estas allogitaj al la juĝa respondeco; 6 redaktoroj estas arestitaj. Pro akcepto de protestrezolucioj kontraŭ kalumnio de hebreoj je kanibaleco estas eksigitaj el Peterburga universitato 200 studentoj; estas ankaŭ fermitaj kelkaj societoj. En Peterburgo estas allogitaj al juĝa respondeco 110 advokatoj por akcepto de protestrezolucion kontraŭ la proceso. Jen la resumoj de tiu ekstraordinara proceso; ĝi finiĝis, sed la premoj ankoraŭ daŭrigas kaj daŭrigos... W. A.

El Nova-Zelando.

Solidareco kreskas en New Zealand. — Ian de Aŭgusto la vaporŝipo „Delphic” ankriĝis ĉe la pulvmagazeno (malnova ŝipaĉo ankrata je 3—4 kilometroj de urbo Auckland). Al la maristoj oni ordonis elŝipigi la pulvon en la pulvmagazenen. La maristoj konsentis, kondiĉe ke ili ricevos samajn salarojn, kiel la metiaj-elŝarĝistoj. La ŝipestro konsentis, kompreneble malvolonte, sed la sekvan tagon, kiam la maristoj eksciis, ke ili estas prenantaj panon el la buŝoj de infanoj de centoj da nedungitaj elŝarĝistoj de la haveno, ili rifuzis elŝipigi plu da pulvo. Sekve la ŝipestro enskribis iliajn nomojn en la „vojaĝ-libro” por ilin poste puni kaj ankaŭ metis je ilia konto la koston de 8 elŝarĝistoj,

kui ilin anstataŭis. Kiam informiĝis la unuigo de la elŝarĝistoj pri la afero, ĝi decidis je tuja agado. Ĝia agada komitato (estraro) vizitis la „Delphic” kaj ordonis al siaj anoj ne elŝipigi plu da ŝarĝo ĝis la ŝipestro konsentos forstrecki ĉiujn punojn de la maristoj. Post duontaga hezito tio okazis, en la ĉeesteco de la maristoj, elŝarĝistoj kaj la ŝipestro.

La unuigo de elŝarĝistoj sendis leteron informantan pri la afero al la unuigo de la maristoj en Londono, petante sciigon se la maristoj de la „Delphic” estos punataj en Londono, por ke la elŝarĝistoj povos „taŭĝe” respondi, kiam la „Delphic” denove revenos.

Antaŭ 2—3 semajnoj la vaporŝipo „Devon” alvenis en la Wellingtona haveno. La lokaj elŝarĝistoj demandis specialajn salajrojn. La mastroj rifuzis. La mastroj tiam proponis la laboron al la ŝip-konstruistoj, la maristoj de la „Devon”, kaj la havenaj oficistoj, sed ili ĉiuj rifuzis. Poste kelkaj el la konstanta stabo de la ŝip-kompanio kaj kelkaj „liberaj” laboristoj elportis ŝarĝon el la „Devon”, sed kiam ili alvenis ĉe la elŝipejo, la transportistoj rifuzis tuŝi la ŝarĝon. La konstantaj laboristoj de la havena konsilantaro estis petata ĝin fari, sed ili rifuzis. La tuta stabo de la havena konsilantaro estis ankaŭ petata, sed ili ankaŭ rifuzis kaj estis eksigitaj. Fine sekvis interkonsento kun la mastroj, kondiĉe de nuligo de punoj kaj de la eksigoj de laboristoj.

C. H. PARKER.

El Sud-Afriko.

La movado laborista. La movado en Johannesburg sekvis la evoluadon antaŭviditan; la partio pli revoluciema reprezentita antaŭe de la „Voĉo de l' Laboro” de Johannesburg — publikigita de A. Crawford, kiu laste estis malliberigata pro ribelado kaj helpita de k-dino Maria Fitzgerald, prezidantino de „Modern Press” — tiu ĉi partio sin deklaris nun favora al sindikalismo, kontraŭdire al parlamentisma partio gvidata de Cresswel kaj Andrews, homoj kapablaj sed atribuantaj pli da valoro al la metodoj kaj la formoj de la organizado ol la celo atingota.

Grava oficisto de nia tiea sindikata sekcio diris antaŭ ne longe, ke ne estis rekomendinda pritrakti al popolo la finan celon de socialismo, sed prefere altiri popolon al la vojo kondukanta. Mi respondis ke mi konsideris kiel nian politikon

prediki kaj disvastigi la fundamentajn principojn de socialismo kaj ke popolo, estante sufiĉe kutimigita al niaj ideoj kaj konvinkita de iliaj justecoj, de la neceseco ilin ekpraktiki, li trovos certe la vojon de li mem.

H. GLASSE.

Tradukis F. S., liberigstelano.

El Franclando.

Kiam la ĉefministro Barthou, kiu ekregis kun malmultnombra plimulto, alvenis ĉe la supraĵon, li deziris plifirmigi sian potencon.

Li komencis parolante pri la neceseco savi la patrujon. Tial li deklaris ke la soldatoj servantaj restos tri jarojn en la servo anstataŭ 2 jaroj.

Tuj post kiam la soldatoj sciis pri la deklaroj de la ĉefministro, ili amase svarmis sur la placoj, kaj manifeste protestis kontraŭ tia senĝeno.

Ili estis multaj kondamnitaj, sed en tiu ĉi mi devas paroli pri pli grava afero.

Ĝi estas pli grava, ĉar ĝi rilatas al homoj ne estintaj en la manifestadoj de la soldatoj, kaj tamen la registaro pretiĝas kondamni ilin plej severe.

Je la mateno de tiuj soldatribeloj, traserĉoj okazis en 88 urboj samtempe ĉe la propagandistoj, sindikatanoj kaj anarĥistoj, eĉ ĉe kelkaj socialistoj.

De ses monatoj ili sidas en la malliberejo, ĉar estis ne tre facile kulpigi ilin pri la ribelincito.

Malgraŭe la kulpigo estas konstruita.

En ĉiu sindikato estas speciala kaso, el kiu oni prenas ĉiutrimonate kvin frankojn, kiujn oni sendas al la kamaradoj soldatoj. Tiu monero estas akompanata de letero kiu memorigas al ili ke ili ne forgesu ke iam ili estis laboristoj, kaj ke baldaŭ ili ĝin reigos. Se la militista devo kondukus ilin antaŭ siajn kamaradojn en striko, ili aŭdu la voĉon de siaj konsciencoj.

Tiaj leteroj, kiuj ofte cirkulas, estis kaptataj de oficiroj.

La kulpigajo diras ke tio estas invito al ribelo; kaj la tuta konstruado havas tiajn fundamentaĵojn miksitaj kun deklaroj de kongresoj.

La juĝo okazos baldaŭ, la 19an de Novembro kaj multaj sindikatoj decidis ke iliaj anoj ne laboros tiun tagon por protesti publike.

Kaj jen peco de iliaj cirkuleroj.

„Rekruto! ci foriras al armeo; sed vestinte cin per uniformo, ci ne devas forgesi kion ni instruis al ci. Pensu pri ciaj fratoj, ĉe ĉiu momento, kaj plenumu cian devon, cian tutan devon al ili. Cia pasado en armeo servu por io. Sed ĉefe ne forgesu ke se oni donas ordonon malan je cia konscienco, cia devo estas rifuzi obeon. Neniu rajtas cin devigi jurrompi.

Lasu cin mortpafi, prefere ol obei”.

Niaj kamaradoj ne diris alian; nur la finiĝo ne estas sama, ĉar estas pli bele ribeli antaŭ malhoma, sovaĝa ordono ol prezenti sin je mortpafato.

En Rusujo por Beilis kaj en Francujo por niaj kamaradoj, estas konstruitaj falsajoj por pli bone mortigi la malamikon.

En Rusujo Beilis estis senkulpigata, en Francujo niaj kamaradoj estos — mi vetas — kondamnitaj.

Francujo estas sub la nivelo de sia kunligato Rusujo.

Tri kamaradoj en St. Etienne (Loire) disdonis je la okazo de foriro de rekrutoj foliojn sur kiuj estis presitaj partoj de la fama parolado de Briand, kiu fariĝis ĉefministro. Ili estas arestitaj kaj kondamnitaj je 2 monatoj da malliberejo.

Jen la afero:

„Se la ordonoj de tiuj kiuj estos viaj estroj lokigas vin iam inter via homa konscienco kaj viaj pseŭdaj devoj de soldatoj vi memoros ke vi estas homoj. Kaj tiam se la ordono pafi daŭrus, se l' oficiro obstina volus malgraŭe trudi la volon de l' soldato, kiam ĝi estas plenigata de tiaj priokupiĝoj, ah! sendube la pafiloj povus ekpafi, sed ne estus eble en la direkton montritan”.

Briand fariĝis ministro, kaj neniam estis kulpigata; niaj kamaradoj ne fariĝos ministroj, ili malbone komencas.

Tamen ĉi estas skribita „Libereco, Egaleco, Frateco”, vi legos tion proksiman jaron en Parizo sur ĉiuj monumentoj, kaj sur la malliberejoj la vorto „Libereco” ne estis forgesita.

A. P.

El Italujo.

Antaŭ du jaroj, kiam Italujo al militis Tripolitanion, rezervisto, Aŭgusto Mazeti, pafis al sia kolonelo, li ne volis iri por mortigi homojn nekonatajn; li provis mortigi malamikon de progreso.

Tamen li ne estis kondamnata. La juĝistoj kaj kuracistoj, pretaj ĉion fari, montris lin kiel frenezulon.

Tiel lia anarĥiista ago kiu estis farata plene konscia estis sciata nur kiel frenezajo.

Neniu pensus imiti frenezulon, dum proceso farita kontraŭ anarĥiisto en tiu momento estus estinta, eble, malbona ekzemplo, la veraj kaŭzoj estante konigataj.

Li estis metata en frenezulejon, sed poste oni metis lin en alian, en kiu estas nur la kondamnitoj frenezaj.

Nu, Mazeti ne estas kondamnito, nek frenezulo, li devas esti libera.

La italaj kamaradoj agitadas por liberigi lin; en Francujo okazis mitingoj por helpi tiun agitadon, la ĵurnaloj, nur revoluciemaj, sciigas la aferon detale, oni helpu ankaŭ inter la esperantistoj, oni sciigu en la naciaj ĵurnaloj tiun fakton, prenante el tiu ĉi alvoko, aŭ petante pli detalajn sciigojn al italaj ĵurnaloj aŭ kamaradoj.

Por la liberigo de ne kondamnita, nek freneza kamarado, antaŭen.

A. P.

Socialista literaturo en Esperanto.

Aĉeteblaj estas nun ĉe administracio de I. S. R., Ostadestraat 94, Amsterdamo, Nederlando, jenaj verkoj:

1. *La Evangelio de la Floro*, de P. Berthelot; prezo 8 Sd.
2. *Kio estas Socialismo*, de Enrico Ferri; 8 Sd.
3. *Pri la esenco de Konstitucio*, de F. Lassalle; 8 Sd.
4. *La piramido de l' tiranio*, de F. Domela Nieuwenhuis; prezo 8 Sd.
- 5—6. *La Reforma Mono de Silvio Gesell*, de D-ro Paŭlo Staniŝiĉ; prezo 16 Sd.
7. *Por ataki kaj por defendi*, de Wilhelm Liebknecht; prezo 8 Sd.
8. *La Salajro*, de Petr Kropotkin; prezo 8 Sd.
- 9—12. *La Miseruloj* de Victor Hugo (1a duono de l' unua volumo, 150 paĝoj en la konata formato de niaj libretoj); prezo 32 Sd.

La tuta serio de 12 n-roj: 1 Sm.

Kamaradoj, ebligu per via helpo la kreskadon de nia ruĝ.

Oni tradukis el I. S. R.:

El Nov. n-ro. art. de Antes (paĝo 274) kaj tiun de Perlov (p. 284), franclingven, por la liberecama gazeto „Le Liberaire”, kun mencio de fonto. F. S., Liberigstelano.

El Okt. n-ro.: „La analfabetoj en Belgujo”, franclingven por la ĉiumonata nov-maltusiana organo „Renovation”. F. S., Liberigstelano.

Ofte aperas tradukoj el I. S. R. en soc.-dem. ĉiutaga en Limoges: „Le Populaire du Centre”; kaj en laborista organo „The Maoriland Worker” en Aucland, Nov-Zelando; kaj en holanda anarĥ. organo.

Estus bone, se ĉiu k-do, kiu ion tradukis el I. S. R. por nacilingva gazeto, sciigus tion post enpresado al Red. de I. S. R.

ESPERANTA MOVADO.

Socia grupo en Bruselo. — Antaŭ kelka tempo artikoleto estis presata en I. S. R. pri la ebla starigo de socia grupo en nia urbo.

Malgraŭ la malhelpo de kelkaj kontraŭuloj, nia ideo efektiviĝis, kaj de post la 12a de Oktobro ia grupo ekzistas. Certe estas grava progreso por Esperanto, sed ni opinias, ke estas ankoraŭ pli grava progreso por Socialismo en nia lando. Ĝis nun neniu kamarado, krom tie kaj tie unu, konis Esperanton; nun dank' al la nova grupo, ĉiuj baldaŭ konos nian lingvon kaj la gravegajn servojn, kiujn ĝi povas doni al ni por nia ĉiama kaj daŭra batalado kontraŭ terura kapitalismo kaj la senkora burĝeco. Efektive, nia celo estos solvi dank' al Esperanto sociajn demandojn, havi ligilon inter ĉiuj kamaradoj, sed precipe eduki sub internacilingva vidpunkto la socialistojn.

Kiam en Februaro, K-do R. de Leener diris, ke oni devus starigi la diritan grupon, K-do Haine kaj Tinaut kaj Schmiedel, tuj aprobis la ideon kaj ĉiuj promesis labori por la efektiviĝo. Sed precipe Edouard Haine laboris kaj propagandis kaj kiam en Oktobro oni ree kunvenis oni jam havis dank' al li multajn aliĝpromesojn.

Fine, oni decidis ĝeneralan kunvenon. Estis tiam la 12an de Oktobro. La kunvenintoj unuvoĉe elektis kiel sekretariojn du el la fundintoj: Ed. Haine kaj R. de Leener, kiuj emocie dankis la ĉeestantojn pri tio, kaj promesis vikle kaj bone plenumi sian taskon.

La kunvenoj regule okazos ĉiudimanche vespere je la 7a, ĉe la sidejo: 21 kaj 23 Boulevard du Hainaut, en Bruselo, ĝis nun la grupo numeras 40 geanojn. Vere, estas beleta progreso.

Ni tie ĉi volas danki „Socia Revuo” kiu publikigis nian unuan alvokon kaj la kamaradojn kiuj respondis al ĝi.

Se iu dezirus pliajn informojn, li estas petata skribi al la sideja adreso, kun la mencio „Socia grupo”.

Dank' al la ĝenerala agemeco, oni de nun jam povas kredi en la estonteco kaj vivado de la jurnaskiĝinta grupo!

Dum la lasta kunveno, per ĝenerala voĉdono, estas aprobita la deziresprimo de K-doj Haine kaj De Leener: „La S. G. el Bruselo, kunveninte la 25an de Oktobro 1913 esprimas la deziron ke baldaŭ la monata revuo nomita „Internacia Socia Revuo” aperu dufoje ĉiunmonate ĉar tiel ĝi faros ankoraŭ plej bonan ligilon ol la nuna inter la socialistaj Esperantistoj kaj montros la ĉiaman kreskon de la progreso inter la „ruĝuloj”. La S. G. esperas baldaŭan plenumigon.

Kamarado B.

Liberiga Stelo. — Centra Komitato. Kunveno de Novembro. Kvin kursoj estas organizitaj ĝis nun en Parizo. K do Louis legas leteron de laborista kooperativo, kiu petas, ke ni organizu esperantan kurson ĉe ĝia sidejo; kaj leteron de „Racionala Esperanto grupo” el Barcelono, kiu petas sciigojn pri „Liberiga Stelo”, ĉar ĝi intencas aliĝi.

Estas decidite skribi al „Esfio” kaj al „Esperantista Sindikatista Federacio” por demandi al ili, kion ili intencas prepari por organizo de la Pariza kongreso. Fine, je propono de iu kamarado, ni decidis presigi 20.000 propandajn afiŝetojn.

La venonta kunveno okazos la 5an de Decembro.

La sekretario P. ASSELIN.

Kelkaj lernantoj kaj anoj de „Liberiga Stelo” intencas korespondadi; ĉiulandaj kamaradoj povas sin turni al mi. P. A.

Sotteville-les-Rouen (Francl.) — 18an de Okt. okazis propaganda eduka kunveno, organizita de „Liberiga Stelo” kaj „Les Amis de l' Avenir Social” kun duobla temo: „Esperanto kaj Internaciismo” de C. A. Laisant, famo konata matematikisto, kaj „Racia Edukado” de K-dino Ida Templier (esperantistino), redaktorino de „Renovation” (Renovigo). Ĉeestis 150 personoj kiuj atente aŭskultis la georatorojn. Kurso laborista komenciĝis kun dudek maturaj gelaboristoj. Neniu idisto ekzistas en la tuta regiono. *)

F. S.

*) En tuta Holando ekzistas eĉ ne unu idisto; Esperanto tra la tuta lando progresas. [Red. I. S. R.]

Rumenujo. — En Ploesti malfermiĝis kurso speciala por la laboristoj organizataj, ĉe la klubejo soc. dem. Partoprenas pli ol 20 k-doj kiuj fervore studas Esperanton.

Arestita pro ricevo de Ĥina revuo. La rumana polico, la polico de la lando kiu pretendis starigi ekvilibron en la Balkanlandoj kaj civilizigi la bulgarojn, por montri sian abomenan rolon kaj sian propran malfcivilizecon, precipe nuntempe kiam la militarismo plifortiĝis kaj ŝajnas regi en la lando, tute perdis sian kapon. Post sennombraj malliberigoj kontraŭ la laboristoj defendantaj iliajn rajtojn, venis la vico ankaŭ de esperantistoj. Tiel, la 13an de Nov. K-do Georgo Pietroi (ab. de I. S. R.) estis arestata sub la sola preteksto ke li ricevis de Ĥinujo revuon. Kelkajn tagojn li estis malliberigita, alveturigita Buzeon, sia patra urbo, kaj ree Bukureŝton; lia loĝejo traserĉita, la korespondajo konfiskita. Nur post energia protestado de la Ĝenerala Komisio de la Sindikatoj, li estis liberigata. La k-doj kursanoj de Ploesti kaj Bukureŝti ankaŭ protestis kontraŭ tiu barbareco de la polico.

E. N.

Deklaro!

La laborista esperantista societo „Frateco”, Leipzig, en sia monata kunsido, okazinte la 3an de Nov. 1913, indigne malaprobis la vortojn diritajn de sia samlandano k-do Tesch el Frankfurt-Main dum la kongreso de „Liberiga Stelo” en Bern. (Vidu I. S. R. No. 11, paĝo 259a).

La grupo opinias, kiam iu k-do hazarde senmandatite vojaĝas eksterlanden, por tie eventuale prezenti sian samlandan verdsocialistaron, tiam li antaŭe informu sin, antaŭ ol li diras neveraĵon.

Kontraŭe, la grupo Leipzig, certe kun la plejmulto de la germanaj laboristaj geesperantistoj defendas la vidpunkton de l' „unuecigo”, de l' kolektado de ĉiuj batalfortoj al bona prosperado de nia estonta konfederacio.

Ne divido (laŭ la vortoj de k-do Tesch), ne politikaj kontrastoj, sed firma kunligo de ĉiuj nacioj, de ĉiunucaj ruĝuloj garantios al ni fortikajon de progreso kontraŭ ĉiaj atakoj de niaj kontraŭuloj. Ne disigo, sed unueco!

Tio estu nia devizo!

KORESPONDADO.

Germanio: K-do Blumenstein, Bernhardstr. 12, Cassel, dez. kor. per pk. kun ĉiulandaj gek doj. — K-do Arthur Wilhelm, 106 Wiesestrasse, Gera, Reuss j. L., dez. kor. — K-do Alfred Naumann, Marienstrato 20/II, Gera, Reuss j. L., dez. kor. letere kaj per pk. koloritaj kun en-kaj eksterlandanoj. — K-do Arno Kern, Deubenerstr. 25 p., Dresden 28, kaj k-do Edmund Fietz, Inietenstr. 10/II, Dresden 28, dez. kor. kun k-do el ĉiuj landoj. — K-do Max Fritzsche, Verlängerte Silberstr. 1, Burgstädt, Sachsen kaj k-do Kurt Krellmann, Am Bahnhof 14, Burgstädt, Sachsen, dez. kor. — Gegrupanoj dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj: poŝtkarte, letere, interŝanĝi gazetojn kaj fotografiojn; ĉiam kaj certe respondos. Sendu ĉion al la grupo „Federacio“ en Chemnitzo, Sängergasse, Logenstrato 31, aŭ al Karlo Hasler en Chemnitz, Winklerstrato 2—I — K-do Richard Litschke, Mettmannerstrasse 11—III, Düsseldorf, dez. kor. kun gek-do en ĉiuj landoj. — K-do Emil Galle, Leissnig in Sachsen, Teichgasse 23, dez. kor. — Gek-do, partoprenante nuntempe kurson, deziras treege korespondajn interrilatojn kun alilandaj gek-do. Skribu al: Esperanto-kurso Leipzig Möckern, Rest. „Carolabad“, Mecklenburgstr. — K-do A. Gerlach en Köln (vidu I.S.R. no. 12) sciigas ne esti f-ino, sed viro; antaŭnomo ne Anna, sed Arno (oni skribu ĉiam nomojn kaj adresojn legeble, por eviti tiajn malagrablajn erarojn. I.S.R.).

Anglujo: K-do John Hoyle, Esperantujo, Wainstalles apud Halifax, serĉas francan aŭ german kamarad(in)on; celo: lernado reciproka de nacia lingvo per Esperanto; ankaŭ ŝatus interŝ. kartojn de bildoj, pentraĵoj kaj statuoj.

Francujo: K-do Maurice Calinaud, 268 rue de Paris, Sotteville-les-Rouen (Seine-Inf.), dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝ. postmarkojn. — Vidu ankaŭ en la rubriko Esperanta Movado.

Hispanujo: K-do P. Brunet, skribmaŝinisto (monotype); Josef Raig, seĝofaristo; Jako Paulet, objektoj-porvojaĝo-faristo, dez. kor. per pk. aŭ letere kun gek doj el la tuta mondo, precipe kun sammetianoj. Adreso: Societo „Paco kaj Amo“, strato Montseny 67—2^o, Barcelona.

Nederlando: K-do Adriaan Kloek, p/a. M. v. d. Burg t, 1e Sweelinckstraat 19—II, Amsterdam, petas korespondadon kun bonaj gekorespondantoj pri seriozaj temoj. — K-do J. Kloek, De Wittenkade 70—I, Amsterdam, dez. kor. kun diversnaciaj gek-do per il. kartoj.